Gottfried Keller,

# Pacon al la kreaĵo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Araneojn malŝatadis
Mi dum junecaj jaroj,
Ili malsupren sin lasadis,
Kuris sur la kap-haroj,
Sidis kaŝe en anguloj;
Min timigis la aĉuloj,
Sur la tablo kuregadis,
La mortigo ne ĉesadis.

Kiam la harar' griziĝis,
Mi ilin ne plu ĉasis,
Tiam fine mi saĝiĝis,
Ilin vivi lasis.
Nun mi ilin rare vidas,
Kaŝe ili ie sidas;
Sed se iu sin vidigas,
Mi min saĝe elvojigas.

Se mi havus infaneton,
Mi gardus ĝin honore,
Gvidus ame la hometon,
Dirus al ĝi kore:
‚Lasu vivi araneojn,
Ili same sentas veojn.'
Frue iĝus ĝi paculo,
Ne nur kiel maljunulo!

...

Gottfried Keller,

# Pacon inter kreaĵoj

*tradukita de Richard Schulz*

Araneoj min naŭzadis,
Dum mi junulo estis,
De l' plafon' malleviĝadis,
Sur la verto-haroj pestis,
Sidis aĉe enangule;
Aŭ kuregis tarantule,
Super manoj kaj vitrino.,
De l' mortig'ne estis fino.

Kiam la harar' griziĝis,
Tiam nur mi ilin lasis.
Pli trankvile mi fariĝis.
Ilin ne plu embarasis.
Kaj fratece ni nun vivas.
Mi ne plu ekofensivas.
Mi endome, ili rete,
Ĉiu agas nun diskrete.

Se mi havus infaneton,
Estus patro honorata,
Montrus mi la fajnan reton,
Al la zorge edukata,
Kaj instruus ĝin ekpreni
Araneojn per la mano,
Ree ilin ekmalteni.
Amus pacon la infano!

...

Gottfried Keller,

# Friede der Kreatur

Spinnen waren mir auch zuwider
All meine jungen Jahre,
Ließen sich von der Decke nieder
In die Scheitelhaare,
Saßen verdächtig in den Ecken
Oder rannten, mich zu schrecken,
Über Tischgefild und Hände,
Und das Töten nahm kein Ende.

Erst als schon die Haare grauten,
Begann ich sie zu schonen,
Mit den ruhiger Angeschauten
Brüderlich zu wohnen;
Jetzt mit ihren kleinen Sorgen
Halten sie sich still geborgen,
Läßt sich einmal eine sehen,
Lassen wir uns weislich gehen.

Hätt' ich nun ein Kind, ein kleines,
In väterlichen Ehren,
Recht ein liebliches, ein feines,
Würd' ich's mutig lehren,
Spinnen mit den Händchen fassen
Und sie freundlich zu entlassen;
Früher lernt' es, Friede halten,
Als es mir gelang, dem Alten!

...

*Traduko de la Germana poemo "Friede der Kreatur" de* Gottfried Keller *(Gotfrido Kelero, ∗1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982-10-10.*

*MR-003-2 / Arg-318-643 (2005-08-02 15:49:32)*

*Traduko de la Germana poemo "Friede der Kreatur" de* Gottfried Keller *(Gotfrido Kelero, ∗1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26) en 1982-10-15.*

*Arg-318-644 (2013-02-26 15:15:16)*

*Pri Rikardo Ŝulco kaj lia Analiza Skolo vidu ankaŭ:* `http://www.ipernity.com/doc/37943/8965446` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Gottfried Keller *(Gotfrido Kelero, ∗1819-07-09 – †1890-07-16).*

*Arg-318-642 (2005-08-02 15:04:45)*